DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (909) • 2014 •

## *Belan kristnaskan feston &*
## *Sukcesan novan jaron*

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ & Bengt Olof ÅRADSSON

La naskiĝo de Jesuo laŭ mezepoka bildo en *Hortus deliciarum* far Herrad of Landsberg (12th century)



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420311241406;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Ne eblas troigi la predikadon pri la amo de Dio | 123 |
| Riproĉo | 129 |
| "Inda" - vespera preĝo | 130 |
| La ĉiutaga vivo en Trento dum la Koncilio | 133 |
| Pri Strasburgo – la ekumena kongreso 2015 | 139 |
| Saluton el Tanzanio | 140 |
| Kotiztabelo | 141 |
| Nekrologo | 142 |
| Ho, venu, Spirit', Di', SInjor' | 144 |

## Redaktoraj vortoj

Kiel rapide pasas la tempo! Per tiu ĉi numero mi finas mian dekan jaron kiel redaktoro, do jam redaktis 60 numerojn de Dia Regno! Trafoliumante kelkajn antaŭajn numerojn mi konstatas ke mia stilo sufiĉe fiksiĝis (aŭ, per aliaj vortoj, mia kreemo perdiĝis). Alia interesaĵo estas, ke mi nun komencas uzi la kvaran komputilon en la redaktada laboro. La programoj kompreneble ankaŭ ŝanĝiĝis, iĝante pli kaj pli talentaj.

Sed la redaktado (pli precize enpaĝigo) estas nur malgranda parto de la tuta laboro pri Dia Regno. Dum tiu tempo la kontribuantaro ankaŭ ŝanĝis. Kelkaj aŭtoroj malaperis pro diversaj kaŭzoj, sed aliaj plenigis la lokojn. Mi estas tre dankema al ĉiuj tiuj, kiuj kontribuis kaj daŭre kontribuas al la verkado de nia gazeto. Mi esperas ke vi, same kiel mi, daŭrigos nian kunan taskon – per varia gazeto disvastigi nian mesaĝon al interesuloj kaj formi kontaktilon inter niaj membroj diverslande. Havu feliĉan Kristnaskon!

# Ne eblas troigi la predikadon pri la amo de Dio

## Evangelizado de Eŭropo - Prelego en Munkeno, en 1995

József FARKAS, hungara reformita pastoro (1914-1999)
Tradukis lia nepino Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Novembre 2014 okazis solena memorkunveno en la budapeŝta eklezia komunumo, kiun gvidis József Farkas ĝis sia morto en 1999. Okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo, oni prezentis filmon pri lia prelego 1995 en Munkeno kun la titolo evangelizado en Eŭropo.



Karaj gefratoj, mi dankas vian inviton kaj atenton. Estas dece, ke unue mi prezentu min mem. Antaŭ kvindek-kelkaj jaroj du, praktike ununuraj infanoj, gejunuloj renkontiĝis en Budapeŝto, kaj post tiom da jaroj mi fariĝis patriarko de 35-membra familio, kiu daŭre grandiĝas: kvin filinoj, dektri genepoj kaj estas survoje la sepa pranepo (en oktobro 2014 naskiĝis la 27a pranepo – aldono de la tradukisto).

Tio estas la statistika flanko, sed mi preferas ankaŭ spirite, anime prezenti min. Unue mi en tri punktoj diras kion mi kredas, kion mi konfesas – poste mi parolos pri mia vera temo.

La unua tezo en mia kristana kredo estas tio, ke veran, plenan homan vivon oni nur per la helpo de superhomaj fortoj povas vivi. Dio tiel kreis la homon, ke nur per kontakto kun Li pleniĝas la homa vivo, nur per persona rilato de la supra mondo.

Mi havas ĉarman metaforon, komparon pri tio: la trolebuso. La trolebuso estas normala aŭtobuso, kiu havas troleon, per kiu ĝi kaptas kurenton el la supro. Ne multaj homoj scias, ke kiam la rusoj enkondukis la trolebusojn, ili ne estis tute certaj en ilia funkciado, ĉar estis multaj problemoj: falis la troleoj, malboniĝis la arĉoj, okazis ke ne estis kurento, ktp. Do pro sekureco oni konstruis ankaŭ aŭtomotoron en la trolebusojn, ke se estas problemo kun la kurento, la ŝoforo nur simple trakonektas la buson kaj daŭrigas la veturadon per la motoro.

Tio estas genia modelo pri la homa vivo! Dio tiel kreis la homan vivon, kiel

la rusoj la trolebuson: estas supra kablo kaj gvidado, kaj la sana homo havas troleon, per kiu kaptas el supro la fortojn kaj la gvidadon, sed li havas ankaŭ propran homan kapablon (motoron). En la plena homa vivo ambaŭ funkcias. Baze devus esti sufiĉe da kurento, kiu venas tra la supra kablo, sed ni estas homoj, kaj bedaŭrinde kelkfoje ne funkcias la kontakto, estas difektoj, kaj estas tiel bone, ke estas en ni humanismo, homa kapablo. Mi konfesas, ke se eblas mi plej multe provas kapti fortojn el la supro, tra la dia kablo. Sed ankaŭ mi estas homo, kaj kelkfoje rompiĝas la kontakto kun Dio kaj tiam mi uzas mian scion, mian volon, mian moralon, mian humanecon.

Do tio estas mia unua kredkonfeso: tiu vivas sanan, plenan homan vivon, kiu havas troleon kaj kaptas kurenton el la supro.

Mia dua tezo estas, ke la ununura ebleco por la transvivo de la homaro estas la nazareta Jesuo Kristo, se ni konformiĝas al Li, se ni obeas al Li. Jesuo Kristo ne nur fondis novan kredon – Li estas la vera Savanto.

Jesuo Kristo kunportis tian programon, ke se la homaro obeas tiun ĉi programon – transvivos la nunan krizon, se ne obeas – kolapsos. Jesuo Kristo ne nur individue savas nin, mi konfesas ke Li estas mia persona Savanto, sed samtempe mi scias, ke ankaŭ kolektive Li estas nia Savanto. Kaj la ununura vojo por la transvivo de la homaro estas, ke al mi gravas la Monta Prediko, la paraboloj de Jesuo, mi plezuriĝas pri la riĉeco de Jesuo, sed Jesuo havas ankaŭ ekonomian programon, havas programon pri la kunvivado de la popoloj, havas programon por la solvo de la malriĉeco, por la solvo de la peko.

> la ununura sekreto de la transvivo de la homaro estas ke la homaro konformiĝas al Jesuo Kristo.

Do, mia dua tezo estas, ke la ununura sekreto de la transvivo de la homaro estas ke la homaro konformiĝas al Jesuo Kristo. Tio signifas, ke oni devas simpliĝi al Jesuo. Kaj la eklezioj, kaj kolektive. La eklezioj troigis la administradon, la liturgion, la dogmatikon, fariĝis laciga tiu ĉi riĉeco de la eklezioj. Do la sekreto de la renoviĝo de la eklezioj ne estas, ke oni eltrovu novan dogmon, novan organizadon – ĝuste inverse: el la nuntempa malsimpla kristanismo simpliĝi pli kaj pli al la spsirito de Jesuo Kristo.

Mia tria tezo: la homaro havas ne nur prapekon, ekzistas ankaŭ pra-boneco en la homoj.

Kiu movadiĝas en ekleziaj rondoj, scias, ke la eklezioj troigas la parolon pri la peko. La homo estas origine pekulo, ne estas korektebla, estas senespera, estas damninda. La eklezioj ŝanĝis la ĝojo-aferon de Jesuo en peko-aferon, ili koncentras sian atenton al la peko.

Kaj mi konfesas, ke jes, estas prapeko, sed apude estas ankaŭ praboneco. Kaj se iu esploras Jesuon, tiu scias, ke la sekreto de Jesuo estas, ke Li ellogis la pra-bonecon el la homoj. La farizeoj, la skribistoj skurĝis la homojn,

kiel ankaŭ multaj hodiaŭaj evangelistoj ofte ne povas alion diri: vi estas pekulo. Sed Jesuo el ĉiuj homoj ellogis la bonecon – la avaran, avidan Zakeon Li ŝanĝis al donacema homo. Li ne faris alion, ol iris vespermanĝi al Zakeo, mi certas ke Jesuo bone manĝis kaj trinkis dum la vespermanĝo – kaj neatendite io moviĝis en Zakeo: Mia Sinjoro, mi disdonas mian havaĵon!

Tio estas mia tria tezo: ne nur prapeko estas en la homo, estas ankaŭ origina boneco.

Tiujn ĉi tri tezojn mi konfesas, kredas, kaj parte mi iras kune, paralele kun la eklezio, parte mi kolizias kun la eklezia praktiko.

Mia vera temo estas: evangelizado de Eŭropo

Ke ni povu paroli pri la parto (pri Eŭropo), unue ni devas paroli pri la tuto. Estas la bazo en la filozofio: parto kaj tuto – la tuto estas la homaro, la parto estas Eŭropo.

La homaro estas en krizo. Tion oni ne devas pruvi, tio estas fakto. Ni pensu pri la malnovaj tempoj, kiam la marksismo-leninismo (ni proksime transvivis tion en Hungario) promesis la teran Paradizon, ankoraŭ kelkaj generacioj kaj estos paradiza la vivo sur la Terglobo. Kie estas sociologo, filozofo, pastoro, politikisto, kiu povus paroli pri la baldaŭa paradiza stato? Tute disfalis tiu ĉi ideologio, hontiĝis tiu ĉi ideo. Anstataŭe aperis tiu terura vorto: transvivo. Anstataŭ la tera Paradizo nia problemo estas kiel transvivi? Transvivi la sekvontajn jardekojn, ne jarcentojn! Kiel eblus transvivi la teruran disvastiĝon de la malriĉeco, la eksplodon de la tromultiĝo, la vetarmadon, la ŝanĝiĝon de la klimato, la multajn problemoj. La problemoj konverĝas, renkontiĝos iam en la unuaj jardekoj de la sekvonta jarcento, kvankam kelkaj el ili jam nun estas neelteneblaj.

Do la homaro estas en krizo kaj devas serĉi la vojon de transvivo. Ĉu la eklezioj povas doni helpon trovi la vojon de la transvivo? Estas gravega demando kaj ne estas facile doni respondon. Se mi respondus, ke jes, la eklezioj povos helpi – mi parolus en la aeron. Sed ankaŭ tio ne estas vero, ke la eklezioj perdis sian aŭtentecon, ili ne povas helpi. Estas komplika demando, kiom da helpo povas doni la eklezioj en tiu ĉi transviva procezo. Mi tion diras, ke ili povus doni pli multe da helpo, sed por tio ili devus ŝanĝiĝi. Mia respondo estas, ke estas granda helpa potencialo en la eklezioj, sed por uzi tiun potencialon necesas, ke la eklezioj tre signife ŝanĝiĝu.

Ni vidu iom da moviĝon de la homaro. Kien iras nun la homaro? Mi ne pensas nun pri la ekonomio, politiko aŭ pri la scienco, mi demandas, ke spirite, spirite kien moviĝas, kien iras la homaro. Eblas rimarki tre interesan kontraŭmovon. Unuflanke la homaro sekulariĝas. Tio signifas, ke la religiaj valoroj, sed bedaŭrinde eĉ la humanaj valoroj senvaloriĝis. Hodiaŭ ne estas sankta mia lando, mia geedziĝo, mia moralo, al la gejunuloj nenio estas sankta.

Unu moviĝo de la homaro estas la sekulariĝado, la totala ĥaoso, spirita kaj morala ĥaoso.

Sed kiu forte atentas, povas rimarki ke ekzistas ankaŭ iu kontraŭ-moviĝo.

La pensuloj, la pensanta parto de la homaro laciĝis pro la sekuraliĝo, pro la materialismo, pro la nihilo kaj serĉas ion. Ekmoviĝis en la homaro iu serĉado, iu kontraŭ-movo. La pli primitivaj homoj ankoraŭ iras al la direkto de la sekuraliĝo, sed la pli pensemaj homoj jam venas reen kaj serĉas ion. Vekiĝadas iu nova spiritualismo. Tio en si mem estus granda ĝojo, precipe se tiu nova serĉado gvidus la homojn reen en la ekleziojn. Sed ne. Tie ĉi estas la granda problemo de la eklezioj, ke vekiĝas en la homoj nova spirituala soifo, sed ili ne interesiĝas pri la eklezioj. Ili pensas, ke la eklezio estas malnova, rigida, la eklezia moralo estas tro malgrandanima. Do la eklezioj eniĝis en tiun ĉi krizan situacion, ke dumtempe vekiĝas la homaro el la nihilo de la sekulariĝado kaj serĉas novajn spiritualajn valorojn – samtempe ili rigardas al Oriento, al hinda religio, al budhismo kaj de tie ili esperas novan spiritualismon kaj ne el la direkto de la eklezioj.

Estas manko de la spiritualismo, pri kio la homoj sentus: jes, tion mi serĉis, diru, kio estas la sekreto de tio.

Pri la nova spiritualismo mi du vortojn metas unu apud la alian: instruo kaj sperto – ambaŭ devas esti en la eklezio.

La instruo, la dogmatiko, la dogmaro, la kredkonfeso estas la intelekta parto; la sperto estas la mistika, persona, intima parto. Instruo kaj sperto.

Mi havas simplan historieton, kiu tre klare montras, kio estas la diferenco inter ili. Apud la vojo staras aŭto, kiu ne funkcias, la ŝoforo ne sukcesas ekirigi ĝin. Li koleriĝas kaj blasfemas Dion terure. Apudiras kristana homo kaj konsterniĝas kaj diras al la ŝoforo: Mia kara amiko, oni ne blasfemi devas, oni devas preĝi! La ŝoforo eĉ pli koleriĝas, kaptas la kolumon de la kristano, sidigas lin al la stirilo, por ke li preĝu. Kompatinda kristano komencas preĝi, mia kara Sinjoro bonvolu funkciigu tiun ĉi aŭton, turnas la ŝlosilon – kaj ekfunkcias la motoro. La kristano ŝokiĝas kaj diras: Mia Dio, tion ankaŭ mi ne kredis!

Tiu ĉi parabolo estas baza historio en la eklezio. La instruo estas: oni devas preĝi kaj ne blasfemi. Sed kiam venas la sperto, mem la kristana homo diras, ke tion eĉ mi ne estus kredinta! La eklezioj havas multege da instruoj, sed malmultege da spertoj, kvankam la homoj bezonas personajn spertojn.

Tio estas la baza demando: kiel povus la eklezio prezenti post la troigo de la instruoj same multajn spertojn. En tiu ĉi mi vidas la evangelizadon de Eŭropo. Meti la sperton apud la instruon. Ne antaŭ aŭ anstataŭ – apude, ke estu harmonio inter ili.

Mi diras biologian komparon. Laŭ mi la plej genia kreaĵo de Dio estas la homa cerbo. Kiel ni scias bone, la homa cerbo havas du partojn, dekstran flankon kaj maldekstran flankon kaj estas tre malsimplaj interakcioj inter ili. Havas tute aliajn funkciojn la dekstra kaj la maldekstra flankoj.

La maldekstra cerb-flanko, kiu kruce funkcias, al la direkto de la dekstra mano, funkciigas la logikon, la kalkuladon, la mekanikon, la geometrion, la racionalismon, tiuj estas la funkcioj de la maldekstra flanko. Al la alia parto, al la dekstra cerb-flanko apartenas la intui-

cio, la spontaneco, la kreiveco, la fantazio. Por ke la homo estu sana, necesas ke ambaŭ flankoj funkciu harmonie kaj havu komunikadon unu kun la alia. Sed la eŭropa (okcidenta) homo kaj bedaŭrinde ankaŭ la eklezio (la protestanta pli ol la katolika) havas la problemon, ke la vivo estas en la maldekstra cerb-flanko, pensado, kalkulado, laboro, gajno kaj velkas la funkcioj de la dekstra cerb-flanko, la intuicio, la espero, la ĝojo, la amo.

Eblas tiel diri, ke vivigi la paralizitan dekstran flankon, aktivigi la intuicion, la kreivecon – tio estas la tasko de la eklezio. La eklezio devas lerni, precipe ni, protestantoj devas lerni, ĉar ni havas vere racian religion. Niaj preĝejoj estas malriĉaj el la vidpunkto de la intuicio, la kreiveco, la fantazio, tiuj ĉi blankaj muroj ne estas tro inspiraj. La tasko de la eklezio estas funkciigi la dekstran cerb-flankon, kunporti ĝin en la plenan homan vivon.

Kion signifas tio? Mi diras tri penso-vekigajn tezojn.

La unua estas, ke ni devas lerni esti silentaj. En silento. Kiel malfacile estas silentigi miajn pensojn. Vespere, nokte ĉiuj povas sperti tion, oni ŝatus dormi, silentu pensoj, silentu, lasu min dormi! Estas multe pli malfacile NE fari ion ol fari ion. Vi provu tuj ĉinokte: kiel malfacile estas ne pensadi, ellasi kaj transdoni min: mia Sinjoro, sufiĉas mia saĝeco, miaj pensoj, instruu min silenti, ĉar la silento estas la baza kondiĉo, ke mia troleo povu kapti la supran, dian kurenton. La unua afero, kiun la eklezio devus lerni, estas la silento, la meditado, la preĝado, la aktiva pasiveco. Tiu tipo de pasiveco, kiam mi silentigas miajn homajn kapablojn, ke mi pli intenzive povu atenti pri la gvidado de Dio. Tio estas mia unua tezo, ke la eklezioj instruu la homojn esti silentaj. La ĉiama kurado, trafiko, mono kaj politiko malbonigas la homan nervan sistemon. Terura estas tiu amoko kiun nuntempe la homaro faras. La unua tasko de la eklezio estas silentigi, malrapidigi tiun ĉi kuradon, esti en silento, esti en trankvileco, preĝi, peti la dian lumon. Plezuriĝi pri la formiko, kiam malfacile kunportas unu semon, plezuriĝi pri unu floro, pri bela besto, pri arbaro, pri pluvo, pri sunsubiro, plezuriĝi pri la mirakla mondo de Dio.

Mia dua tezo estas, ke oni devas lerni tiel gvidi la ekleziojn, ke malgrandaj grupoj funkciu en la eklezio. Ĉar sola mi ne povas fari tion, pri kio mi parolas, kaj kun cent homoj mi denove ne povas tion fari.

Do inter la ununura homo kaj la cent-homa-grupo oni devas meti malgrandajn grupojn. Eĉ la plej moderna psikologio ne povas diri pli bonan, ol dekdu. Jesuo havis dek du disĉiplojn kaj oni malkovris post multe da esploroj, testoj, ke la plej ideala estas la dekdu-homa-grupo, tio ankoraŭ povas envolvigi la societon, sed povas esti sufiĉe intima, ke ili povu interparoli.

Hejme en nia eklezia komunumo en Budapeŝto ni jam longe faras tion, kaj mi tiel opinias, ke ne tiu estas la vera membro de nia eklezio, kiu nur dimanĉe venas al la diservoj – sed tiu estas, kiu apude membriĝas en pli malgrandan grupon, en amikan grupon, en komunumeton. 7-8-9 grupoj estas, kiuj mem-

stare vivas, amikiĝas, kaj kiuj en unu el tiuj internaj grupoj intensive vivas, en frateca amo, preĝo, tiuj estas la fidelaj membroj de la eklezio. Do, grupoj. Oni devas dividi la amason da homoj (estas kelkloke, kie ankoraŭ estas amaso da homoj). Laŭ mi tio estas la vojo de la estonteco, la kredantojn grupigi en pli malgrandajn viv-komunumojn, grupojn.

Mia tria tezo estas, ke la kristanismo estas ĝoj-afero kaj ne pek-afero.

Dio estas nia Patro! Abba, diris Jesuo. Nia Patro, kiu ĉirkaŭbrakumante akceptas siajn filojn. Ekvidas sian prodigeman filon kaj kuregas antaŭ lin. Ne estis dece, ke juda patro kuregu, precipe ne al devojiĝinta, hont-plena filo, sed tiu ĉi estas la Dio de Jesuo. Koncentri pri Jesuo signifas tion: la modelo estas la Patro de la prodiga filo. Tiun ĉi evangelion ni devas disvastigi. Dio estas nia Patro, kiu amas nin, kaj nur amas, kaj per ĉiama amo amas kaj ankaŭ malinde amas nin.

Tio estas la tria tezo pri la renoviĝo de la eklezio: tiun ĝoj-mesaĝon diskonigi. Jesuo venis savi la pekantojn, ĝojigi la tristulojn kaj proklami la indulgon de Dio. Tiu estas la tria tezo de la renoviĝo de la eklezio, de la evangelizado de Eŭropo: trovi la vojon reen al Jesuo. Nia afero ne estas pekafero, nia afero estas ĝoj-afero, ĉar Dio estas nia amanta Patro.

Ankaŭ en nia eklezio estas kelkaj homoj, kiuj kelkfoje diras al mi, ke mi devus uzi skurĝon en la predikejo dum miaj predikoj. Sed mi neniam ricevis tra mia supra kablo tiun mesaĝon, ĉiam nur tion, ke vi parolu pri mia amo.

Kiam mi mortos, kaj se Dio diros al mi, ke vi tro multe parolis pri mia amo, kelkfoje vi ankaŭ estus devinta uzi la skurĝon, mi respondos, ke mia Sinjoro, tiun ĉi eraron ankaŭ antaŭ Vi mi volonte akceptas. Vi estas ĉiama amo, ne eblas troigi la predikadon pri la amo de Dio.

## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus




**9. decembro**

Patro nia, ĉe Vi estas la fonto de ĉiu vivo. Kiam ni forgesas tion, tiam niaj vivoj fariĝas senakvaj kaj senvivaj. Ni ĉiam denove iru al la fonto kaj trinku la akvon de la vivo.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 122).
Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.

Julia Sigmond, IT/RO

# Ĉu scipovas ami tiu, kiu ne kapablas malami?

gr. István Széchenyi

Mi malamegas la riproĉon. Eĉ se ĝi estas justa, sed la maljustan simple mi ne povas elteni.

Okazis iam, ke iu riproĉis al mi ion, absolute maljuste. Apenaŭ mi povis silenti kaj ne tuj defendi min, ĉar mi estis profunde vundita.

Tiam okazis, ke mi ekpripensis: sed mi neniam ofendis aliulojn per riproĉoj, ĉu?

Kaj mi komencis rememori pri diversaj homoj, al kiuj mi iam ajn riproĉis. Ĉiam tiel mi sentis, ke tute juste mi diris tiujn riproĉajn vortojn, tamen, neniam mi pensis, ĉu mi ne vundas la animon de tiu persono per mia parolo?!

La homoj, ĝenerale, emas esti malobjektivaj, kaj pensas nur pri si mem, pri propraj sento, penso kaj opinio. Ĝis oni ne konatiĝas kun la amplena empatio, kiu helpas silenti kaj ne subite respondi kaj nepre reofendi.

Tiu okazo bone helpis min, ke mi kapablu kompreni: la riproĉo al neniu utilas. La aferoj aŭ la okazintaĵoj jam ne estas ŝanĝeblaj.

Ĉar kio okazas?

Ni ricevas riproĉon, nome ofendon, t.e. nia vundita animo doloras. Se ni reriproĉas, nome reofendas, tiam anstataŭ unu vundita animo doloros du!

Komprenante tiun simplan logikan kalkulon, mi komencis la memedukadon. Bonŝance, la eduko havis bonan rezulton. Verdire jam nur maljuniĝinte, sed mi neniam riproĉas (aŭ reriproĉas) al iu ajn.

Feliĉiga sento estas. Iuspeca superhoma sento! La amo venkas kaj la homa animo pleniĝas per dankemo pro la anima forto.

# “Inda” — vespera preĝo

dum la ekumena kongreso en Trento,
19-an de aŭgusto 2014

Éva Farkas-Tatár, HU

Kiam mi prepariĝis por tiuj vesperaj renkontiĝoj, mi pensis pri tio, ke tamen post unu monato mi estos jam 90-jara, kaj eble neniam plu mi renkontos vin. Kaj eble pli gravaj estas la lastaj vortoj kiujn ni aŭdas de iu.

Kvankam mi konas multajn afablajn personojn jam de la sesdekaj jaroj, kaj tre ofte ni renkontiĝis en tiaj someraj semajnoj kaj ni havis multajn belajn komunajn travivaĵojn antaŭ la Sinjoro ankaŭ en profundaj preĝoj, tamen certe multon ankaŭ ili neniam aŭdis de mi kaj pri mi.

Tial mi pensis pri tio, ke mi diros al vi kelkajn tiajn mesaĝojn, kiujn mi persone ricevis en malfacilaj horoj de mia vivo. Inter ili estas vortoj de Dio kiuj direktis nin ankaŭ kiel familion inter malfacilaj cirkonstancoj. Mi devas diri al vi, ke ne estas facile vere sincere paroli pri propra interna vivo, sed mi sentas tiun instigon, ke mi devas tion ĉar eble neniam plu mi havos la okazon.

Hieraŭ mi tion volis emfazi, ke post ĉiu malkonfeso, ĉiu peko oni kuraĝe reiru al Jesuo Kristo, ĉar por li tio estas grava “ĉu vi amas min?” Nun mi portis al vi la vorteton “inda”. Kiam mi kelkfoje estas en romkatolika meso, min ofte kaptis tio, ke oni diras ĉe la eŭkaristio, ke mi ne estas inda, ke vi venu en mian hejmon, domon. En la Biblio tiel ĉarme estas skribite: ke vi venu sub mian tegmenton. Mi ne scias ĉu katolikoj kiuj regule tiun vorton diras travivas tion tiel profunde, min multe tuŝis tio, ke mi ne estas inda.

-------

Kaj mia kristana vivo tiel komenciĝis, ke mi estis baptita kaj instruita pri la religio laŭ la reformita eklezio. Kaj kiam mi estis 15 jara, mi prepariĝis por la konfirmacio. Ni estis multaj knaboj kaj knabinoj, kiuj regule vizitis dum la tuta jaro ĉiusemajne la paroĥejon kaj ni havis tre seriozan kaj afablan pastoron. Ni multon legis en la Biblio, la evangeliojn, la evangeliajn historiojn, la miraklojn kaj la instruojn, kaj kompreneble juna kapo ankaŭ pli bone funkcias, do ni multon lernis. Ni lernis ankaŭ konscie parkere historietojn kaj la tielnomatajn orajn diraĵojn, do ili estis resumoj de iu historio aŭ specialaj vortoj el la Biblio.

Kaj alvenis la tempo por la konfirmacio. Tio ĉe ni okazis en Pentekosto, kaj en nia komunumo antaŭan semajnon ĉiuvespere ni kunvenis kaj ni prepariĝis kun pento-farado. En la lasta tago, do sabate vespere nia pastoro prenis la dekalogon kaj laŭ sufiĉe moderna aktuala formo li legis ilin unu post la alia, inter ili lasis iom da paŭzo. Kaj tiam la Sankta Spirito – kiel mi diru? – tuŝis aŭ skuis min, ke mi subite sentis, ke mi ne kuraĝas iri morgaŭ al la sankta tablo, ĉar mi ne estas inda. Mi rompis ĉiujn, kaj mi absolute ne kuraĝas tien iri antaŭen. Plorante mi iris al nia pastoro post la

diservo, kaj mi diris, ke mi vane klopodas, sed mi ne estas inda kaj mi ne kuraĝas iri morgaŭ antaŭen.

Kaj tiam li diris: sed kara, ĉu vi ne memoras kion diris Jesuo Kristo? Ke la malsanuloj bezonas kuraciston? Kaj mi ne venis al la justuloj, mi venis al la pekuloj por savi ilin. Mi tute bone konis tion, do mi ankaŭ parkere povus citi tiujn vortojn, sed tio estis io alia. Subite tia lumo ĉirkaŭis min, kaj mi eksentis, ke tion nun nia Sinjoro Jesuo Kristo diras, al mi, al Eva Tatár diras Li nun, ke vi estas savita! Kaj Li nun ĉirkaŭbrakas min, ke mi estas Lia. Kaj tio estis iu eterna decido. Mi ne povas tion priskribi, kion mi travivis, kaj de tiam mi pensas, ke nun mi jam estas kristano kaj mi apartenas al Li. Tio estis iu tre-tre forta lumo, sed ne estis timiga, sed ĝojiga lumo, kiu ĉirkaŭis min, do mi preskaŭ flugante iris hejmen.

Sed tio komenciĝis tiel, ke mi ne estas inda. *Mi ne estas inda*. Kaj tiam Li povis tiel ĉirkaŭbrakumi min.

Poste mi havis longan vivon, kun multaj kulpoj, multaj eraroj, multaj malfidelecoj, pro kio mi ofte hontis kaj petis pardonon denove kaj denove, sed mi neniam spertis tion, ke Jesuo Kristo estus malfidela. Li tenas min en Sia mano kaj neniu povas de tie forpreni min, kiel Li promesis tion.

Kaj mi devis travivi ankaŭ tion, ke en tiu "neniu" ankaŭ mi enestas. Ankaŭ mi. Neniu povas min forpreni plu el Lia mano.

Miaj stumbloj ne ŝanĝis tiun situacion, ke mi estas savita. Sed ofte mi spertis tion, ke paliĝas la ĝojo. Mi perdas emon, kuraĝon, perdas esperon, sed kiam mi tion travivis, ĝenerale ne iu stumblado estis malantaŭe. Sed tio, ke mi ne sentis tiel, ke mi ne estas inda. Eĉ iel fortiĝis tio, ke tio estas memkomprenebla, ke mi ricevas tion, ke mi havas sanajn infanojn, ke mi havas bonan familion, ke ĉio ordiĝas ĉirkaŭ mi. Kaj mi sentis, tiel mi komencis senti, ke jes, nature. Eble neniam mi diris tiel krude, ke mi "meritas" tion, sed esence io tia estis malantaŭe. Kompereneble. Tio estas natura afero, ke ĉio ordiĝas ĉirkaŭ mi. Ke mi havas bonan edzon, ke en la komunumo oni ŝatas nin, ke niaj infanoj estas sanaj kaj afablaj kaj saĝaj.

-----

Tiam, kiam tiu ĉi pensmaniero, tia ideo komencis kreski en mi, tiam mi perdis tiun internan ĝojon. Sed Jesuo estis ĉiam fidela kaj en preĝo montris al mi la kaŭzon, ke tiu paliĝo, griziĝo, tiu malfortiĝo radikiĝas en tio, ke mi perdis tiun senton, ke Sinjoro mi ne estas inda, ke vi venu sub mian tegmenton. Sed vi scias, ke mi invitas vin tien kaj tie estas via loko.

Hodiaŭ mi tion ŝatus (estas romantika vorto, sed mi tamen tiun vorton ŝatus uzi) *heredigi al vi*, ke ne forgesu tion, ke ne mi estas inda, sed Jesuo Kristo estas granda kaj kompatema. Li estas la bildo (ikono) de la nevidebla Dio, de nia Ĉiela Patro, kiun Jesuo tiel prezentas al ni kiel la Patron de la perdita filo kiu jam de malproksime rimarkas tiun kompatindan filon, kiu malkuraĝe sed tamen iras jam hejmen, La Patro kuras antaŭen kaj sen riproĉo brakumas lin kaj kisas lin, Tiun, kiu ne estas inda, sed klopodas iri hejmen al la Patro.

Dio benu nin, ke ni malfermu la korojn kaj akceptu tiun mesaĝon, kiun la Sinjoro ĝuste hodiaŭ vespere volas transdoni al ni.

# La ĉiutaga vivo en Trento dum la Koncilio

## prelego dum la ekumena kongreso en Trento

Norma Cescotti Covelli, IT

Je komenco de la deksesa jarcento, Bernardo Cles, princepiskopo de Trento, havis ambician projekton: kunvoki en sia urbo la plej gravan koncilion, kiun la historio memoras.

En norda Eŭropo la katolikismo estis en danĝero pro la disvastigo de minacantaj misdoktrinoj. Martin Lutero instigadis la fidelulojn por ke ili kontraŭstaru la koruptiĝon de la klerikaro, sin liberigu de la hegemonio de tradiciaj povoj, papo kaj imperiestro, kaj starigu, sen perantoj, rektan rilaton kun Dio.

De Svislando Giovanni Calvino kaj la humanisto Huldreich Zwingli malmilde kritikadis la papon kaj la roman kurion. Ili persvadis la kredantojn malakcepti eĉ la ideon de Sakramento kaj postuli la liturgian modifon. En Britio la reĝo Enriko la VIII proklamis sin mem estro de anglikana Eklezio. Tiaj herezaj doktrinoj jam trairis la Alpojn invadante la tutan trentlandan diocezon kaj minacante etendiĝi al aliaj regionoj.

Jam de la januaro 1524 la tiama papo Clemente la VII, vigle ekindignis kontraŭ Bernardo Cles, ĉar li ne sukcesis malhelpi la komercon de herezaj eldonaĵoj en sia princolando. En posta tempo la princepiskopo kolektigis ĉiujn danĝerajn skribaĵojn disajn en sia teritorio kaj bruligis ilin surplace je la ĉeesto de la tuta loĝantaro. Poste li informis la papon pri tio, proponante al li ununuran rimedon por ĉesigi la etendiĝon de la protestantismo, tio estas: antaŭaranĝi ekumenan koncilion, cetere plurfoje petitan eĉ de Martin Lutero. Li indikis, kiel laŭcelan lokon, la urbon Trento, ĉu pro ĝia geografia situo je limo kun centra Eŭropo, ĉu pro ĝia submetiĝo tere kaj spirite al episkopa regado. Li aneksis al

---



Bernardo Clesio (1484-1539) (naskiĝis en Kastelo Cles, proksima de Nonsberg, en la 11-a de marto 1484 – mortis en Brixen, en la 30-a de julio 1539) estis itala kardinalo, episkopo, princo, diplomato, humanisto kaj botanikisto. Naskita en Cles, Trentino, li studentiĝis ĉe Universitato de Bolonjo, kaj poste iĝis princo-episkopo de Trento (1514-1539), episkopo de Brixen (1539), kardinalo, kaj kanceliero de la Imperiestro de la Sankta Romia Imperio Ferdinando la 1-a.
Li estis fundamenta kontribuanto al la organizo de la Koncilio de Trento, alportante la koncilion al sia hejmurbo Trento kaj tre plibeligante kaj vastigante la urbon por tiu evento. Li pligrandigis la Kastelon Buonconsiglio kaj alvokis renesancajn artistojn kiuj dekoraciis la novajn salonojn. Tamen Bernardo ne povis partopreni al Koncilio de Trento, ĉar li neatendite mortis en 1539, ses jaroj antaŭ la malfermo de la koncilio. [El Vikipedio}

sia letero kelkajn skizojn de la urba mapo, indikante la plej taŭgajn lokojn por la disvolviĝo de tiu evento.

Bedaŭrinde Bernardo Cles ne sukcesis ĉeesti la malfermon de koncilio de li forte dezirita. La 13an de marto 1545 papo Paolo la III sendis al Trento tri kardinalojn, por ke ili konstatu la adekvatecon de la proponitaj lokoj.

La kardinalo Cristoforo Madruzzo, posteulo de Bernardo Cles, pretigis por ili plenparadan akcepton. Eĉ ne petinte la papan rajtigon, li promesis trijaran kaj trikvarantenan indulgencojn al la ĉeestontoj dum ilia alveno. Li starigis imponan triumfarkon, planis solenan procesion tra la urbo ordonante al la loĝantaro ornami domojn per drapoj kaj insignoj.

La legatoj, post la plenumo de sia inspektado donis favoran takson kaj ricevis papan buleon kun la ordono malfermi la koncilion la 13an de decembro 1545. Sekve oni antaŭaranĝis la gastigadon.

Al la membroj de konsula Magistrato prezentiĝis grave solvotaj problemoj: provizi la partoprenontojn per provianto kaj brutaro nepre necesaj. Oni interesigis la komunumojn ĉe dekstra bordo de rivero Adige pri loĝeblecoj, staloj por ĉevaloj kaj muloj, pri la utiligo de ĉaroj da aveno kaj pajlaĵo necesaj al brutara nutrado. La urba statuto anoncis, ke la vendistoj de buĉobestoj trairantaj la Trentlandon vendu la kvinonon de ili al la buĉejo de Trento. La Konsuloj antaŭaranĝis la ŝtonpavimon de la ĉefaj stratoj kaj enlokigis grandan horloĝon sur la urban turpinton per kiu skandigi la tempon dum la konciliaj kunsidoj.

Du dungitoj, deĵorantaj po dekdu horoj estis devigataj supreniri la turpinton, batsonorigi mane ĉiun horon, krii laŭte ĝin suben al la civitanaro, gvati por ke ne estu bruldanĝero en la ĉirkaŭaĵo kaj, tiuokaze sonorigi alarmon.

Oni entabeligis la disponeblajn loĝejojn kaj brutejojn, la provianton, la hejman kaj personan tolaĵojn. Oni fiksis lupagojn por loĝejoj kun meblaruzado kaj apartajn kompensojn al tiuj kiuj disponigis propran domon al konciliaj Patroj.

Estis nomataj “Cride” la publikaj proklamoj, kiujn heroldo laŭtkriadis trairante la urbajn stratojn por kunigi la loĝantaron sur la granda placo. Dum la irado li martelis ĉiun vorton je intertempa tamburado aŭ triobla trumpetsignalo.

Atendante la koncilion oni promulgis nombrajn “cride” por protekti la publikan ordon, la moralecon kaj la decon.

La almozuloj kaj vagabondoj estis forpelataj el la teritorio kaj, se okaze iu el ili estus tentata reeniri urben, li estus tujtuje mortigita de kiu ajn kaj ĉiamaniere. La malriĉuloj estis izolataj en



Kastelo Buonconsiglio

la kvartalo Piedicastello, vivtenataj je elspezoj de princepiskopo kaj de la civitanaro. Oni estigis gardistaron el 250 soldatoj. Estis malpermesite kunporti armilojn enurben kaj eĉ tiuj rajtigitaj ne povis uzi la glavon je minaco de tri ŝnurtiroj. Estis neeble draŝi grenojn, sterni surstrate netanerajn felojn, bredi silkraŭpojn kaj trairi la urbon kun ŝafaroj. Oni rajtigis tranĉi la manon al tiu, kiu bastonis aŭ bastonigis iun alian. La nutraĵvendistoj estis devigataj oferti ĉiutage parton de sia varo al la episkopa rento.

En malvarma nokto de la dekunua de decembro 1545 heroldo kunvokis per "crida" la civitanojn, en la ĉeesto de notario, por anonci la baldaŭan malfermon de koncilio. Oni instigis ilin multe preĝadi, iri konfesi, fasti dum tri tagoj kaj komuniiĝi je celo atingi plenan sukceson de tia grava evento.

Ĉiu plenumonta tion estus obteninta, interŝanĝe, plenan indulgencon.

La sekvantan matenon la urbo vekiĝis inter grandaj ĝojoplenaj manifestacioj. La nutraĵvendistoj ekspoziciis antaŭ siaj vendejoj la tipe lokajn produktojn, de neniu, tamen, aĉetatajn pro respekto al la deviga fasto.

Kardinalo Madruzzo, siaparte, klopodis, por ke la koncilio ne aperu, laŭ lia diro, modesta kunveno de mekanikistoj. Pro tio li dekoraciigis la konciliajn lokojn per altvaloraj drapoj, tolaĵoj kaj satenoj. Li meblis la kunvenejojn per orizitaj foteloj por la papo kaj la imperiestro, per remburitaj altseĝoj purpurruĝe velurtegitaj por la konciliaj patroj, per lignaj benkoj kun dorsapogiloj arte ĉizitaj por la akompanantoj.



Kardinalo Cristoforo Madruzzo. [Titian, 1552]

Tiamaniere li aperigis la katedralon de Trento kiel riĉegan specimenaron pri teksaĵoj, brokatoj, brodaĵoj, stoloj kaj sacerdotaj drapiraĵoj okultire elfinitaj per oro kaj arĝento.

Rimarkinde estis la krucifikso de koncilio, ligne skulptita, kun ambaŭflanke, la statuoj de la Virgulino kaj de Sankta Johano, hodiaŭ ankoraŭ elmontrita en la katedralo. Dum la tuta koncilio ĝi tronis fronte de konciliaj Patroj lumigante iliajn mensojn dum la decidoj de gravaj dekretoj. Popola legendo rakontas, ke tiu kristostatuo, je fino de koncilio, klinis iomete la kapon donante sian lastan aprobon.

Jen, kiel aperis la urbo antaŭ la okuloj de la unuaj alvenintoj. La tagpriskribanto de koncilio, episkopo Angelo Massarello kaj la hispano Andrea Vega prinotis tion:

*"Trento estas urbo kun malpli ol 10.000 loĝantoj, regata tere kaj spirite de sia episkopo. La grafo de Tirolo estas tie reprezentata de sia kapitano. Estas 1000 domoj, belegaj konstruaĵoj, regulaj stratoj, larĝaj placoj, multaj palacoj el kiuj mastras pro beleco kaj imponeco tiu episkopa. Ekster la loĝata areo fluas torento Fersina, kies akvo, devojigita kaj disbranĉigita en kanaletoj, laŭ la ĉefaj urbstratoj estas utiligata de la loĝantoj por kuiradi, mastrumadi, kaj por iliaj personaj necesoj.*

*En la urbo kunvivas du etnaj grupoj: itala kaj germana. Ĉiu loĝas en sia kvartalo, viroj kaj virinoj surmetas siajn tradiciajn vestaĵojn, frekventas sian preĝejon kaj aŭskultas la predikistojn per propra lingvo. Plejfoje, tamen, oni aŭdas paroli germane.*

*La urbo, lokita ĉe alpaj piedoj, je limo inter Italio kaj centra Eŭropo, ofertas agrablan ripozon al tiu devenanta de nordo kiu transpasas altegajn montojn. La teritorio produktas bonan vinon, bonegan panon kaj ĉion necesan al nutrado. La civitanoj, ĉu Italoj, ĉu Germanoj estas afablaj, honestaj kaj bonedukaj. Karakterizaj estas la ĉarmaj domoj kun fasadoj verve freskitaj. "*

Ne ĉiuj opinioj, tamen, estis favoraj. En la rimarkoj de la toskana Torello Fola, ekzemple, oni legas:

*"Trento estas kaŝejo por Germanoj kaj rifuĝejo por Italoj ĉi-tien alkurintaj por eviti siajn misfortunojn. Somere la klimato estas sufoke varma kaj, pro la nombraj kanaletoj fluantaj laŭ la stratoj, la aero estas malseka kaj ne salubra. Vintre neĝo kaj glacio igas la urbon neloĝebla ĉar la kanaletoj frostiĝas kaj*




Trento dum la 16a jc (kopio farita en la 18a jc)

*la civitanaro restas sen akvo. La loĝantoj estas krudaj, suspektemaj kaj la virinoj ne estas belaj. Ĉiuj, viroj kaj virinoj ŝatas supermezure la vinon kiun ili trinkadas neniam miksitan kun akvo ".*

Post la malfermo de la koncilio ekaperas iom post iom la unuaj eminentuloj. Alvenas la dekokjara dukido de Savoia, Emanuele Filiberto, kun sekvantaro de dekdu paĝioj kaj tridek korteganoj, ĉiuj rajdantaj sur purrasaj ĉevaloj. Estas luksega parado de mikskolore elegantaj kostumoj, malakordiĝantaj kun la ŝtrumpo-gainoj kaj la modestaj tuniketoj de popolanoj spalirantaj ĉe ilia paso. Alkuras virinoj de la tuta Trento allogataj de tioma pompo.

Malgraŭ la intence elmontrita riĉaĵo tiu juna princo ne havas eĉ unu moneron en sia poŝo, pro tio li tre volonte akceptas la oportunegan sumon da 2000 eskudoj donacitan de kardinalo Madruzzo kiel koncilian memoraĵon. Tiu sumo permesas la daŭrigon de lia vojaĝo

al Vormes, kie li renkontiĝos kun sia promesita edzino. Per tiu sumo oni povas satigi la tutan loĝantaron de la episkopa princlando.

Alvenas la reĝo de Hispanio, Filippo la II, kun sia pompa sekvantaro, tiel same ankaŭ kardinaloj kaj episkopoj, denaskaj nobeloj aŭ tiuj karierintaj, je servo de kortegoj, jam de longe apartenantaj al la renesanca papŝtato kaj al ĝia profana pompo. Ĉiu el ili kuniĝas kun konsiderinda sekvantaro kunmetita el sekretarioj, konsilistoj, ĉambristoj, koĉeroj k.t.p. La kardinalo Gonzaga, ekzemple, kunportas 160 sekvantojn kaj la duko de Guisa alvenas kun 80 personoj inkluzive sia preferita nano.

La ĉeesto de tiel varia partoprenantaro modifas la klerikan karakteron de koncilio kaj similigas ĝin al la grandaj laikaj kortegoj, en kiuj la ĉiutaga vivo estas markita de festoj, ludoj, bankedoj, amintrigoj, iafoje kun mortigaj konsekvencoj.

La 25an de julio kaŭzas multe da bruo la notico pri la transiro en Trento de la potenca pontifika armeo sendita de la papo por helpo al Karlo la V. La kardinalo Madruzzo kun sia multnombra kortego el prelatoj kaj legatoj iras renkonte al ĝi al la kamparo de Mattarello por eviti ĝian eniron en la urbocentron. La Trentanoj, enfermiĝintaj siahejme, baras pordojn kaj fenestrojn dum la konciliaj Patroj, teruritaj, sin konfidas al preĝado, al fasto, al procesioj por obteni la Dian protekton. Bonŝance la impona armeo transiras norde pasante sub la urbaj murpiedoj, tiel ke Trento estas ekster danĝero.

La princepiskopo Cristoforo Madruzzo, kaj, pli poste, la nevo Ludoviko, lia posteulo, laŭ la tiama politiko de nepotismo aplikata de iuj religiuloj, estas

## Influo de la katolika reformo en la muziko

La koncilio havis rimarkeblan influon ankaŭ sur la muziko, precize en la gregoria kanto. Oni klopodis, fakte, ĝin revenigi al la origina pureco, per la elimino de ĉiuj artifikoj aldonitaj laŭ la kuro de la jarcentoj. Estis forigitaj la tropoj kaj preskaŭ ĉiuj sekvencoj: estis, krome, fortranĉitaj ĉiuj spuroj de profana muziko, kiel la cantus firmus (Kanto firma) ne devenigita el la gregoria. Ankaŭ ĉi-tie, tamen, notindas la escepto (kiel jam por la liturgio) por la ambrozia kanto, en la Milana diocezo.

Oni konfidis fine al Giovanni Pierluigi Palestrina kaj Annibale Zoilo la taskon redakti novan eldonon de la liturgia muziko kiu respektu la decidojn de la koncilio. Tamen, la muziko akompananta la religiajn ceremoniojn neniam estis limigita al la gregoria kaj ambrozia kanto. Multaj inter la plej famaj komponistoj kiel Monteverdi, Händel, Bach, Vivaldi, Charpentier, Cherubini, Haydn, Mozart, Verdi, Rossini ktp verkis mesojn, vesprojn, psalmojn, himnojn kaj aliaĵon en la stilo de sia epoko, kaj ĉiuj tiuj verkoj estis senriproĉe ludataj ĉu kiel liturgia muziko ĉu kiel simplaj koncertoj. [El Vikipedio]

ambaŭ el nobela familio. Eĉ atinginte la kardinalan oficon ili ne forlasas siajn aristokratajn kaj mondumajn kutimojn. Ili sin vestas princmode kaj, ĉiufoje, kiam alvenas aŭ foriras ia grava eminentulo, ili aranĝas, ĉe la festsalonego de princa palaco, abundajn bankedojn, kiujn sekvas dancoj pludaŭrantaj ĝis mateniĝo. Por igi pli agrabla la restadon de la eminentaj gastoj, ili planas batuojn en la cervoĉasejo, apud la episkopa palaco, loko ankoraŭ hodiaŭ nomata "Cervara". Ofte ĉiun festenon sekvas piroteknikaĵoj kaj, tiucele oni konstruas liliputajn kastelojn el ligno ekipitajn de ŝtuparo, loĝio, balkonoj kaj statuoj. La interna parto funkcias kiel scenejo por teatraĵoj, je kies fino oni bruligas la tutan kastelon eksplodigante miriadon da fajroj kun granda lumefekto.

La Trentanoj estas nelacigeblaj dancantoj. Je ĉia okazintaĵo ili sin ellasas al senbrida ĝuo kaj sin fordonas al popolaj dancoj celantaj amindumadon aŭ favorakiron. Ili deziras tiel forgesi la ĉiutagajn zorgojn. Estas ankaŭ tradicia moro, ke ĉiuj partoprenantaj la festenojn, sen ia ajn distingo, estu devigataj al dancado, kaj ke la plej honorinda gasto, unue, malfermu ĝin. Ĉe la kortego de Madruzzo same okazas tio, eĉ la kardinalo intencas, tiamaniere, pli soleni la ĉeeston de siaj invititoj. Aliflanke li opinias, ke la danco estas taŭga rimedo por iom deturni ilin de la pezaj oficoj.

Tamen la plejmulto el liaj gastoj estas kardinalo aŭ episkopoj, kiuj, malgraŭ siaj altrangaj oficoj, ne povas malrespekti la lokan tradicion por ne ofendi sian gastiganton. Pluraj klerikuloj, travivintaj ĉe kortegoj, kaj de longe alkutimigitaj al mondumeco sentas neniun embarason. Sed aliaj, jam vivantaj en spirito de katolika reformo, konsideras tiajn laikajn amuzojn nekonvenaj al graveco kaj seriozeco de klerikaro. La kardinalo de Sankta Kruco, Marcello Cervini, ekzemple, malgaje konsideras:

*"Kion povas esperi la episkopoj kuniĝintaj ĉi-tempe kaj ĉi-loke por korekti la moliĝintajn morojn de popolo kaj doni ekzemplon de bona vivregulo kiam ili, unue, pasigas la tempon saltetante kaj dancante?"*

La koncilio daŭras preskaŭ dudekon da jaroj, subdividita, fojfoje, per ia paŭzo. La Trentanoj travivas ĝian tutan daŭron en eŭforia stato, certe tre malsame ol sia antaŭa vivsistemo. Eĉ la malriĉuloj, izolitaj en kvartalo Piedicastello, fine rajtas sin nutri sufiĉe kaj ĉiutage per la abundaj restaĵoj de la episkopa manĝotablo, aŭ de aliaj bankedoj ĉiam pli ofte sinsekvantaj ĉe la disaj vilaoj en la teritorio.

Enurbe oni aŭdas paroli malsamajn lingvojn, plejfoje nekonatajn, cirkulas ĉiaspecaj moneroj, pli aŭ malpli valoraj, kaj pliiĝas la laboro de la monŝanĝistoj. Kreskas okulvide ankaŭ la prezoj de porvivaĵoj kaj de la lupagoj. La princepiskopo, siaflanke, estas tre malavara al siaj gastoj. Al ĉiu el ili forlasanta la koncilion, li donacas, kiel "memoraĵeto" abundan monsumon aŭ ian altvaloran objekton, precipe potaron aŭ pentraĵon kiuj dekoracias la episkopan palacon

Pro logika konsekvenco kreskas ankaŭ la ŝteloj, la hazardludoj, la sorĉaĵoj kaj la laboro de monfalsistoj. Ĉiam pli ofte armitaj viroj partoprenas la dancvesperojn, kaŭzante, laŭ influo, danĝeran rival-

econ inter korteganoj kaj Trentanoj. Sekve de tio estas necese malpermesi la dancojn dum ĉiuj festoj provokante la koleron de la tuta loĝantaro.

Por urĝe eviti pli aĉajn sekvojn la princepiskopo promulgas pli severajn "cride".

*"La ŝtelistoj pro ŝteloj je valoro de pli ol 100 liroj, se viroj estos pendigataj, se virinoj, bruligataj. Pro ŝtelo je pli malalta valoro la kulpulo estos publike vipbatata. Se li obstinas en sia eraro, estos forpelata de la teritorio sed, antaŭe oni tranĉos lian orelon por ke li estu ĉie rekonata kiel ulo ne akceptebla."*

Oni sankcias punojn kontraŭ sorĉistinoj, krimuloj pri incesto kaj sodomio, konfesprenantoj, kiuj absolvos kunkulpulojn pri kelo, hommortigo kaj ĉia formo de voluptamo. La blasfemuloj estos mergitaj en la riveron Adige, puno nomata "tonca", la adultuloj estos publike vipfrapataj, la monfalsistoj, se nobeloj, estos senkapigataj, se plebanoj, bruligataj. Iu ajn, kvankam religiulo, kiu gastigos aŭ kaŝos kulpulon dum kontumaco, suferos pezan monpunon, aŭ tri ŝnurtirojn.

En la jaro 1563 la koncilio estas proksima al la fino. Dum la lasta kunsido la kardinalo de Lorena, en la nomo de ĉiuj, ekkantas kelkajn aklamojn. Li bondeziras longan vivon al la papo, al la imperiestroj Karlo kaj Ferdinando, al la reĝoj protektintoj la koncilion, al la legatoj kaj kardinaloj. Al ĉiu li deziras feliĉan revenon al sia lando. Neniun apartan aklamon al kardinalo Madruzzo, kiu tiom klopodis ke ĉio funkciu en la plej bona maniero. Neniun etan aludon al la Trentanoj longe devigitaj al toleremo de 255 elstaruloj, kiuj, de ĉiam ĝuantaj ĉiun vivkomforton ne penis konformiĝi al la modesta ekonomia kondiĉo de la regiono, male, senĉese ili plendis pro ĉio kaj ĉiuj.

La 4an de decembro, post la kanto de la danka Tedeumo kaj la forveturo de la lasta gasto, oni ekforprenas la altvalorajn drapojn kaj velurojn, aŭ pli ekzakte, la malmulte restantajn, ĉar la plimulto el ili forflugis kiel "memoraĵeto".

Kvin jarojn poste, la Trentanoj ankoraŭ klopodas por ensorbi la malŝparojn, nuligi la ŝuldojn kaj alfronti la pliiĝantan senlaboron. Post longa ebriiĝo pro amuzoj, post daŭra alternado de gajaj karavanoj, de mallaboremaj kavaliroj nur okupiĝantaj pri amindumado de belaj virinoj, nun necesas reveni al la simpla, teda, laborema vivsistemo, rimarkinte kiom oni fariĝis malriĉaj!

Tamen la koncilio ne havis nur negativajn konkludojn. Dum la tuta tempo Trento ĝuis grandan ekonomian plialtiĝon, kadre de minejoj, manifakturaĵoj kaj komerco. La ĉeesto enurbe de nombraj kleruloj, precipe itallingvanoj, kontribuis al la disvastiĝo de renesancaj idealoj kaj de la itala kulturo.

La enkonduko de la kontraŭreformo, aldone, provokis grave lingvajn sekvojn. La Koncilio estigis inversigon de tendenco pro la vasta diskonigo de la itala lingvo kun malavantaĝo de la germana, antaŭe adoptita ne nur de la klerikaro sed ankaŭ plejparte de la teritoria loĝantaro.



# 21a Ekumena Kongreso

## 68-a de IKUE 65-a de KELI

1-8/08/2015, Strasburgo (FR)

"Donu al mi trinki (Joh 4:7)" —
"La malsameco pliriĉigas min"

Kristana Esperantista Ligo Internacia kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista invitas vin al la ĉefurbo de Alzaco kaj de Eŭropo por partopreni en la 21a Ekumena Kongreso (65a de KELI kaj 68a de IKUE)

Strasburgo atendas vin de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2015. Vi estos akceptataj en la junulardomo Ciarus proksime al la centro de la urbo.

Estas bona okazo ekumene postkongresi post la UK en Lillo. Ni esperas ke vi profitos kaj la kongreson kaj la urbon.

### Kelkaj praktikaj indikoj:

Strasburgo atingeblas trajne, buse kaj aviadile.

El la **flughaveno** eblas atingi la stacidomon de Entzheim, de kie oni povas trajne iri al la centra stacidomo de Strasburgo per "navedo" (*navette*). Ekzistas *billet multimodal*, bileto kiu validas por trajno kaj tramo.

Por alveni al Ciarus el la centra **stacidomo**, oni prenu la tramon C ĝis *Broglie* [prononcu Broj]. Poste piede, meze de la placo maldekstren *Rue de la Fonderie*, trapasu la ponton, iru inter la preĝejo kaj la justica palaco, vi tiam estas sur la ĝusta strato Finkmatt. Estas ŝildo ĉe Ciarus.

Se vi venas per **internacia buso**, vi prenu tramon (A aŭ D) norden al la centro ĝis la haltejo *Homme de fer* kie vi ŝanĝos al alia tramlinio (B, C aŭ F) orienten (dekstren) ĝis la sekvanta haltejo (*Broglie*) kaj daŭrigos kiel supre.

Se vi nepre bezonas helpon kaj aŭton, vi povos telefoni al (franca numero) 06 84 81 53 25.

Se vi venas per **aŭto**, vi kalkulu kun la adreso, 7 Rue Finkmatt, F-67000 Strasbourg. Telefono : +33 (0)3 88 152 788. En ne tuj apudaj stratoj estas eblecoj senpage parki la aŭton. Ni studos aliajn eblecojn.

La 2-litaj ĉambroj estos prioritate atribuitaj al paroj. Pensu ke ni devos tamen uzi plurajn suprajn litojn.

Ne hezitu mencii sur via aliĝilo vian kontribuon al la programo de la kongreso. Tiel vivos nia kongreso.

# Saluton el Tanzanio

Saluton, mi ŝatus gratuli vin (KELI) pro la laborego kiun vi faras por disvastigi Evangelion al geesperantistoj tutmonde. Mi regule ricevas "DIA REGNO"-revuojn kaj legas pri la laboro farata. Vere Dio benu vin pro tio.



La salutanto staras due de maldekstre kun kelkaj geesperantistoj Kristanoj.

Momente mi legas DR de oktobro kiu multe kortuŝis min precipe pri la Ekumena Esperanto Kongreso kiu okazis en Trento-Italio kaj partoprenis KELI-anoj el 10 landoj laŭ listo de partoprenantoj. Certe mi tre ĝojis kaj ŝatus ke ankaŭ mi partoprenu tian kongreson estonte se mi trovus eblecon.

Prediko de s-ro Philippe Cousson multe kortuŝis min. Ĝi donis forton en mia koro. Kial mi diras tion???. Ĉar dum jaroj mi vidas dividon inter kristanoj kaj ĉiu klopodas paroli laŭ sia doktrino religia kiu ne estas signifoplena en la korpo de Jesuo (eklezio). Tio kaŭzas konflikton inter kristanoj kaj forigas unuecon inter Kristanoj.

Ni bezonas Dion, ni bezonas Kristo-unuecon inter kristanoj. Estas multo en la klarigoj de Philippe kiuj sekvindas kaj mi vere lernas multon de ĝi. Fine foliumante la revuon (paĝo 87) mi trovis ke ges-roj Mats kaj Anna Landfors ankaŭ partoprenis la kongreson. Mi konis ilin antaŭ dekjaroj kaj vidas ke ili ankoraŭ amas KELI kaj aktivas.

Salutojn
Dismas el Tanzanio.

# Membriĝo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno

per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

## Kotizoj de KELI 2015

| | |
|---|---|
| Individua membro (kun Dia Regno) | 20,00 EUR |
| Familia membro (sen DR) | 2,00 EUR |
| Subtenanta membro (kun DR) | 30,00 EUR |
| Dumviva membro (20-obla jarkotizo) | 400,00 EUR |
| Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI | 16,00 EUR |
| per libroservo | 18,00 EUR |
| KELI-anoj rajtas aboni ESPERO KATOLIKA pere de la KELI-kasisto | 12,50 EUR |
| IKUE-anoj rajtas aboni DIA REGNO pere de C.O. de IKUE | 10,00 EUR |
| Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj | 3,00 EUR |
| Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n) | Donaco |

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtgire al **Universala Esperanto-Asocio,** Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**

   konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97
   Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50
   Svedio: 74374-0
   Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio,** Rotterdam, menciu: por KELI-konto **kelk-p:** BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:
   Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;
   ✆ +36 302 000 306; 💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

---

# Membriĝo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

Landaj kotizoj:

**Britio**; 15 GBP

Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006 "Fellowship of British Christian Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP; 💻 jean@bisset100.freeserve.co.uk

**Bulgario** *)
Peranto: S-ino Ivanka Kircheva Stoyanova
P.O. Box 701, BG-9000 Varna
✆ + 359 52 639628,
💻 ivanka_esperanto@abv.bg

**Ĉeĥa Respubliko** 300 CZK
kaj
**Slovaka Respubliko** 15 EUR
Peranto: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10. CZ 29 001 Poděbrady II,
✆ +420 311 241 406,
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Estonio** *)
Peranto: Endel Ojasild, PK. 24, EE-10502 Tallin,
💻 endel.ojasild@gmail.com

**Finnlando** 30 EUR
Eblas aboni Dia Regnon uzante landan peranton de UEA aŭ laŭ la pagmanieroj menciitaj sur antaŭa paĝo.

**Francio** 25 EUR
CCP n-ro 10 456 15 U Paris, “Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL)”. Kasisto: Samuel Gaillard
5 rue Maurice Ravel,
FR-63800 Cournon d’Auvergne
✆ +33 (0)4 73 84 31 31,
💻 samuel.gaillard@ac-clermont.fr

**Germanio** 24 EUR
Evang. Darlehnsgenossenschaft Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37
“Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V.”
Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,
✆ 02573 / 626,
💻 hetifisch@googlemail.com

**Hungario** *)
Peranto: Irén Bagi, Baross u. 54/B.II.8, HU 1201 Budapest
✆ 01 283 6566

**Japanio** 20 EUR
(aerpoŝte + 3 EUR)

**Korea Respubliko** 20 EUR
(aerpoŝte + 3 EUR)

**Nederlando** 20 EUR
(por membroj de KUNE +5 EUR)
Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75
“Chr. Esperanto Verg. KUNE”
Kasistino: Gerda Dercks,
Molenstraat 20, 7607 AL Almelo
✆ +31(0)546 819 403,
💻 gcamdercks@home.nl

**Pollando** 30 PLN

**Rumanio** *)
Peranto: Maria László, OF1.C.P. 38 Exterior, 4800 Baia-Mare
✆ 062 426182,
💻 laszlo_maria@yahoo.com

**Rusio** *)
Peranto: Larisa Kuzmenko, Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil, Sverdlovskaja Obl. Rusio,
💻 klarisa8@yandex.ru

**Slovaka Respubliko** (vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko) *)

**Svedio** 250 SEK
Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0
“Kristliga Esperantoförbundet”
Kasisto: Bengt Olof Åradsson,
Nygatan 10 A, lgh 1102;
S-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Svislando** 20 EUR
Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)

**Usono** 30 USD
Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al la peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207
💻 jeraldveit@yahoo.com

*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

# Nedko Nedev



La 14-an de oktobro 2014 forpasis en malsanulejo en Sofio, Bulgario, Nedko Nedev. Dum pluraj jaroj li loĝis en Nederlando ĉe sinjorino Elly Schaap-Glas. Lia sano fariĝis pli kaj pli problema kaj li plurfoje reiiris al sia hejmlando por kuracista kontrolo kaj medikamentoj. La kor-operacio ne savis lin. Post du kaj duona monato en la hospitalo, Nedko forpasis. Li kelkfoje vizitis kristanajn kongresojn kun Elly.


Kelkaj el inter vi eble rememoras lin de la kongreso en Zöblitz, Germanio.

Ni sincere kondolencas Elly.


*Els van Dijk*

## Konciza historio de Kristanismo

Mia edzino, kiu partoprenis la ekumenan kongreson en Trento, kunportis al mi noveldonitan libron de Gerrit BERVELING. Li verkis maldikan libron pri la historio de Kristanismo. En la antaŭparolo li skribas ke la libro ne pretendas esti scienca historio, tamen serioza. Mi ankoraŭ ne tralegis la tutan libron sed tamen povas rekomendi ĝin al ĉiu. Ĝi estas facile legebla libro kaj klarigas kio okazis dum la jarcentoj post Jesuo. En mia jun-aĝo, en la lernejo, mi iom lernis pri la kristana historio kaj la dividiĝo en multajn branĉojn, sed preskaŭ ĉion forgesis. Nun per tute aliaj okuloj kaj intereso relerni nian historion kaj iom pli bone kompreni kio okazis dum tiuj jaroj vere estas granda ĝojo. Aĉeteblas surrete. /redaktoro



# Ho, venu, Spirit', Di', Sinjor'




1. Komm, Heiliger Geist, Herre Gott,
erfüll mit deiner Gnaden Gut
deiner Gläub'gen Herz, Mut und Sinn,
dein brennend Lieb entzünd in ihn'.
O Herr, durch deines Lichtes Glast (Glanz)
zum Glauben du versammelt hast
das Volk aus aller Welt Zungen.
Das sei dir, Herr, zu Lob gesungen.
Halleluja, Halleluja.

2. Du heiliges Licht, edler Hort,
lass leuchten uns des Lebens Wort
und lehr uns Gott recht erkennen,
von Herzen Vater ihn nennen.
O Herr, behüt vor fremder Lehr,
dass wir nicht Meister suchen mehr
denn Jesus mit rechtem Glauben
und ihm aus ganzer Macht vertrauen.
Halleluja, Halleluja.

3. Du heilige Glut, süßer Trost,
nun hilf uns, fröhlich und getrost
in deim Dienst beständig bleiben,
die Trübsal uns nicht wegtreiben.
O Herr, durch dein Kraft uns bereit
und wehr des Fleisches Ängstlichkeit,
dass wir hier ritterlich ringen,
durch Tod und Leben zu dir dringen.
Halleluja, Halleluja.

KOMM, HEILIGER GEIST, HERRE GOTT

• EG 125 • RG 501 • kp. GL 247, LBW 163 • M (Komm, Heiliger Geist, Herre Gott): Ebersberg ĉirkaŭ 1480, Erfurt 1524 • germana T: Ebersberg ĉirkaŭ 1480 laŭ la antifono *Veni sancte spiritus, reple* el la 11a jc. (strofo 1), Marteno Lutero 1524 (strofoj 2 kaj 3) • E: Albrecht Kronenberger 2014-05-11